pdf. iompostiom .net 006

internacia reta printebla gazeteto – kompostita el retaj fontoj – por sur la tablo en esperantaj kluboj

Junule

Kandidatoj serĉataj por Eŭropa volontula servo

Venas el la novaĵletero tejo-aktuale

La 10-an de majo 2007, la franca nacia agentejo por Eŭropa Junulara Programo akceptis la projekton "Ekkoni Esperanton en lernejo", aferon iniciatitan de la Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo (EKC). La oferto de EKC estas konsultebla en la angla kaj franca lingvoj sur la retpaĝo http://rurl.org/2v6; E-lingva skizo haveblas per EKC mem (ĝia TTT-ejo troviĝas ĉe http://esperanto.toulouse.free.fr). Estas serĉataj nun en EU-landoj taŭgaj kandidatoj 18-26 jaraĝaj por la posteno de Eŭropa Volontulo; oni aprezus, ke kandidatoj estu rekomenditaj de sia landa asocio, kaj ke ilia scio de Esperanto estu atestata de diplomo aŭ de esperanta asocio. Kandidatoj devos turni sin al sia nacia agentejo por Eŭropa Junulara Programo.

Letere de Johan Derks

Karaj,

Ekzistas tiom da novaj iniciatoj en la reto.

Ofte tiuj estas de individuoj, kiujn oni ne konas, almenaŭ kiuj ne estas ĝenerale konataj en la Esperanto-movado.

Mia grada zorgo en la Esperanto-movado estas, ke tiuj inciatoj ne estas kunordigitaj, ne havas paralelan celon kun aliaj inciatoj, ne estas pripensitaj de reprezentaj organoj de la movado.

Neceso por la Esperanto-movado estas, ke oni ne dronu en informadon, kiu estas ne-kontrolita, hazarde celita, ne akordiĝas kun pli ĝenerala strategio, difinita kaj akceptita de reprezenta organizaĵo.

Pli-malpli hazarde mi malŝarĝas ĉi-tie mian zorgon. Eble la iniciatinto(j) de la gazeteto iompostiom deklaru sian identecon kaj reprezentecon.

Redakcie

Kara sinjoro Derks,

Mia celo de ĉi tiu gazeteto mallonge estas kunordigi *jam ekzistantajn* retajn projektojn kaj informojn, kaj ilin liveri al Esperantaj kluboj kaj instruadoj. Mi jam iom spertas pri Esperantaj projektoj kaj do komprenas viajn zorgojn, kaj mi do esperas ke vi povas trankvile dormi, aŭdinte la ekzistokialon de ĉi tiu vere malgranda gazeteto. [...]

Cetere mi volas demandi, ĉu mi rajtas publikigi vian leteron en sekva eldono de la gazeteto? Mi tre ŝatus plenigi ĝin ankaŭ per ĉi tiaj tre rajtaj demandoj.

Samideane,

Joop Kiefte / LaPingvino

Promese

Verda Stelo

http://www.eo.pledgebank.com/verda-stelo

"Mi promesas **meti verdan Esperantostelon sur mian ĉemizon,** sed nur se **60** simpatizantoj de nia Internacia Lingvo promesas meti esperantan simbolon sur siajn vestaĵojn KAJ se ankaŭ unu el ili min diros kie mi povas trovi tian steleton en Flandrio."

— Andreo Peetermans, juna esperantisto belga